

Nia kvaronjarcenta esperantisteco, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 738, 1977.11.30 & 12.02 & 03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ ekzakte 25 jaroj ni komencis praktiki esperanton. Por iel marki tiun ĉi personan eventon ni prezentos al vi dum kelkaj semajnoj rememorojn, kiuj havos aŭtobiografian karakteron.

A.- Kiel ni raportis la pasintan semajnon, unuajn informojn pri esperanto ni trovis en la kronikoj de Edmond Privat, kiujn ni regule legis en la gazetoj *Coopération*, *L'Essor* aŭ *La Sentinelle*. Kaj kiam profesoro en la porinstruista lernejo asertis okaze de leciono pri la instruado de la franca lingvo, ke esperanton oni ne povas paroli, ĉar ĝi estas artefarita, kaj ke ĝi estas lingvo sen animo ne kapabla havi literaturon, tiam ni reagis informigante pri tiu ĉi senanima lingvo.

Cl.- En la organizaĵo Internacia Civila Help-Servo, kies aktiva membro mi estis, dediĉante miajn feriojn al konstruado de fromaĝejo en la alpa vilaĝo Erschmatt, mi konatiĝis kun esperantisto nomata Jules Gillard. Mi tuj telefone petis sciigojn al li, kaj li invitis min. La sabaton mi biciklis al lia urbo La Neuveville. Li estis fraŭla ĝardenisto, sed lia hejmo respegulis intelektan aktivecon. Li montris al mi leterojn, kiujn li ricevis de japanaj, brazilaj kaj finnaj korespondantoj. Min impresis lia esperanto-biblioteko. El sia libraro li prenis romanon, kies titolon kaj enhavon mi ĉiam rememoros. Estis *La longa vojo* de Mey. Helpe de vortaro kaj ŝlosilo li montris al mi, kiel oni povas deĉifri esperanton. Li tutcerte estis lerta pedagogo, ĉar mi adiaŭis lin jam leginte plurajn paĝoj kaj kun la intenco daŭrigi tiun ĉi legadon. Mi memoras, ke la dimanĉon multe pluvis. La tutan tagon mi dediĉis al la plua deĉifrado de *La longa vojo*, kaj je unu vorto mi stumblis. Mi ne povis kompreni la signifon de **kurilaĉo**. Mi telefonis al mia amiko Jules Gillard, kiu moketis pri mi.

A.- Li diris : rigardu la signifojn de **kuri**, de **ilo** kaj **aĉa**, kaj funkciigu vian cerbon. Se vi ne trovos, vi estas vere stulta.

Cl.- Mi funkciigis mian cerbon, kaj mi malkovris la riĉecon de la zamenhofa lingvo, ke **kurilo** sinonimas al **marŝilo** aŭ **paŝilo** kaj al **kruro** kaj **gambo**. Mi konvinkiĝis, ke la profesoro Louis Roulet parolis pri io nekonata kaj la lundon mi prezentis mian malkovron al miaj studkamaradoj en la porinstruista lernejo.

A.- Estas tiel, ke miavice mi informiĝis pri la esperanto-gramatiko kaj ties karakterizaj finaĵoj. Kiam anonciĝis esperanto-kurso, pluraj el ni ekpartoprenis ĝin. Bedaŭrinde la kurs-etoso ne estis entuziasmiga, kaj baldaŭ el la studentoj de la porinstruista lernejo restis nur la plej konvinkita kursano : Claude Gacond.

Cl. La instruisto estis ĉefe interesa ekster la kursĉambro. Mi akompanis lin ĝis lia hejmo, kiu troviĝis sur mia vojo, kaj mi ŝatis aŭskulti lin rakonti pri la kontaktoj, kiujn li havis kun aliaj esperantistoj kaj pri la plej legindaj literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj.

A.- Al la loka esperanto-grupo post kelkaj monatoj ni iris kvarope. Ankaŭ tie ni ne ricevis tre kuraĝigan impreson pri esperanto. Ĉio disvolviĝis sufiĉe monotone : unue preskaŭ blinda protokolantino pene laŭtleĝis ne interesan kaj tro longan raporton pri la pasinta kunsido. Poste sekvis lingvaj ekzercoj sen precizaj celoj. Trinkiĝis teo, manĝiĝis biskvitoj. Tiam fine

disvolviĝis pli libera programo. La duan aŭ trian fojon la du knaboj Claude Gacond kaj Eric Benoît rid-eksplodis dum la legado de la protokolo, kaj la tutan vesperon ili daŭrigis sian komunikeblan ĝislarman ridadon, ke ni, la knabinoj, hontis. Kaj tiel finiĝis nia regula frekventado de grupkunvenaj ceremonioj.

Cl.- Tamen ni ne restis pasivaj. Kun mia kamarado Eric Benoît mi vizitis en Aŭstrio la TEJO-kongreson en Wörgl. Ni petveturis ĝis tie kaj alvenis nokte malfrue post la inaŭgura vespero. Ni volis munti nian tendon. Kamarado nin helpis. Per poŝlampo li lumigis la kampon. Kaj li informiĝis, ĉu ni bezonas ion. Jes, ni respondis : koverton ! Estis meznokte. Li esprimis miron, sed tamen li foriris por nin kontentigi. Baldaŭ estis nia vico miri, kiam fakte li alportis koverton. Kovrilon ni deziris. sed ni ne kuraĝis esprimi nian bedaŭron. Dum la tuta nokto mi frostis meditante pri la nepra bezono ellerni esperanton.

A.- Fakte el la studentoj el la porinstruista lernejo nur ni du ellernis la lingvon. La aliaj iom post iom seninteresiĝis pri esperanto, kvankam kelkaj partoprenis plurajn aranĝojn.

Cl.- Kunsidon de Svisa Esperanto-Societo mi partoprenis unuafoje en Berno. Tie mi vere ĝuis pri la parolado, kiun prononcis Edmond Privat. Se mi ne eraras, li interese raportis pri siaj kontaktoj kun kelkaj ŝtatestroj. Poste mi laciĝis kaj nenion plu komprenis. Mi sentis min fremda al la kunsida etoso, kiu disvolviĝis sub la rigardo de la Majstro. Verdaj flagetoj dekoraciis la tablon. Pri kotizoj, statutoj, prezidonto la kunsidantoj verŝajne parolis. Sed subite ĉiuj turniĝis al mi. Iu faris al mi demandon. Mi ruĝiĝis ĝis la oreloj, ĉar vere nenion mi komprenis. Kaj por eliri la embarasan situacion mi balbultis ion. Ĉiuj aplaŭdis. Mia honto kreskis. Kelkajn tagojn poste mi ricevis grandan pakaĵon kun leterpapero, kovertoj, ŝtamlilo : kaj aliaj sekretariaĵoj. Mi tuj porinforme telefonis al la sendinto, kaj responde mi aŭdis, ke min la berna kunveno elektis kiel sekretarion por la junulara sekcio. Kion fari ? Estis tro malfrue por diskuti. Mi decidis honeste plenumi mian funkcion.

A.- Pri tiu ĉi porjunulara aktiveco ni raportos venontan semajnon. Vi aŭdis elsendon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !